| | | |
|---|---|---|
| 28. **Panto** | = | universala |
| Pantologo, io | = | sciencologo, scienculo pri la universala sciencaro |
| Pantografo | = | reduktilo aŭ grandigilo de bildoj |
| Pantogramo | = | (l. s.) |
| Pantoskopo | = | largevida fotolenso |

En la finremarko mi volas reemfazi ke mi elektis en tiu-ĉi artikolo trakti nur sciencajn terminojn, kiuj posthavas la sufiksojn **-logo, -grafo, -metro, -skopo.** Carte ekzistas pluaj branĉoj de terminologio, kiuj povus esti simile pritraktotaj. Eble iu kompetentulo entreprenos la pluan sistemigon de tiu problemo.



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 15, n-ro 3/4 (1965)

347.933 + 937 (497.2)

## PROBLEMOJ DE LA ESTINGANTA PRESKRIPTO[1]) EN RILATO AL LA BULGARA CIVILA JURO

**(de Ljubomir Mihajlov, Bulgario)**

### I

Laŭ § 118 de la bulgara Leĝo de la debitoraĵoj kaj kontraktoj »se la debitoro plenumas sian debitorajon malgraŭ ke ĝi estas estingita per la estingata preskripto, li ne havas rajton postuli reen la pagitaĵon . . .«. Laŭ § 32 al. II de la sama Leĝo »la juĝplendato, kontraŭ kiu oni postulas plenumon de nuligebla kontrakto, povas postuli per ekscepcio la nuligon de la kontrakto, malgraŭ ke lia rajto estas estingita per la estinganta preskripto«.

El tiuj ĉi tekstoj kaj aliaj similaj la bulgaraj juristoj konkludas, ke la estinganta preskripto ne estingas la tuŝitan rajton.

Tiu ĉi kokludo starigas la demandon: Se la estinganta preskripto ne estingas la rajton, tiam kia estas la funkcio de tiu ĉi preskripto? Kion estingas la estinganta preskripto?

La respondo de tiu ĉi demando postulas klarigon de kelkaj demandoj koncerne la realigon kaj la ekzercadon de la rajtoj2).

### II

La rajtoj realiĝas diversmaniere: per ago de la aktiva partio (la titolulo de la rajto), per ago de la pasiva partio kaj fine per ago de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn.

La maniero de la realigo de la rajtoj dependas unuflanke de la karaktero de la rajto kaj aliflanke — de la volo de la partioj.

La sekvontaj ekzemploj, prenitaj el la funkcianta bulgara civiljuro, povas ilustri la menciitan diversmanierecon de la realigo de la rajtoj.

---

1) extinctive prescription (A), prescription extinctive (F), Verjährung (G), prescrizione (I), iskovaja davnost (R).

2) ekzerco de la rajto — ago de la titolulo de la rajto, direktinta al realigo de la rajto.

Ekzemplon de realigo per ago de la titolulo de la rajto prezentas la realigo de la konstituanta rajto de la akurata partio de la kontrakto ĉesigi la kontrakton, se la kontraŭa partio kulpe ne estas plenuminta ĝin. Tiu ĉi rajto ekzistas nur ĉe kontaktoj, per kiuj ne estas translaciitaj, konstituitaj kaj ĉesigitaj absolutaj rajtoj (kiel ekzemple rajto pri proprieteco) koncerne nemoveblajn materialajn objektojn. Sekve, se per la kontrakto ne estas translaciita, konstituita aŭ ĉesigita absoluta rajto koncerne nemoveblajn materialajn objektojn kaj se la kontrakto kulpe ne estas plenumita de iu el la partioj, la akurata partio povas ĉesigi la kontrakton nur per sia ago. Tio signifas, ke en tiu ĉi kazo la rajto realiĝas nur per ago de la titolulo de la rajto. Do, tio estas la ununura ebla maniero de la realigo de tiu ĉi rajto. La realigo efektiviĝas per eksterjuĝa eldiro de la titolulo de la rajto. Por la ĉesigo de la kontrakto estas sufiĉa nur la eldiro de la titolulo de la rajto, ke li ĉesigas la kontrakton. Juĝproceso por realigi tiun ĉi rajton estas superflua. Juĝpretendo por la realigo de tiu ĉi rajto devas esti rifuzita kiel procese neallasebla. Objekto de juĝproceso povas esti nur la postulo por konstati, ke la rajto estas jam realigita (kompreneble ĉe ekzisto de procesa intereso). La realigo mem tamen ne povas esti objekto de la proceso.

Ekzemplon de realigo de la rajto per ago de la titolulo de la rajto prezentas ankaŭ la realigo de monkreditoraĵo, kiam ĝi estas akompanita kun mondebitoraĵo de la kreditoro rilate al sia debitoro. Ankaŭ en tiu ĉi kazo la rajto povas esti realigita per ago de la titolulo de la rajto. Sufiĉa estas la eldiro de la titolulo de la rajto, ke li rifuzas la plenumon de sia debitoraĵo por religi sian kreditoraĵon. Per tiu ĉi eldiro lia kreditoraĵo realiĝas. Necesas nek ago de la debitoro, nek interveno de la juĝo. La eldiro mem realigas la rajton.

Per ago de la titolulo de la rajto povas esti realigataj ankaŭ rajtoj, laŭ kiuj oni povas realigi faktan povon koncerne la materialajn objektojn. Tia estas ekzemple la rajto de la luanto realigi faktan povon koncerne la luatan materialan objekton. Ĝis kiam la objekto estas en la fakta posedo de la launto la rajto realiĝas per lia ago. Realigante la faktan posedon la luanto realigas sian rajton.

Realigo per ago de la pasiva partio — tio estas la libervola plenumo de la ŝuldo. Tiel, ekzemple, kiam la debitoro libervole pagas la ŝulditan sumon, per tio li realigas la rajton de sia kreditoro.

Kaj fine, ĉiuj rajtoj, kiuj povas esti realigataj per libervola plenumo de la ŝuldo, ĉe manko de libervola plenumo realiĝas per ago de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn. Laŭ tiu ĉi maniero realiĝas ankaŭ rajtoj, pri kiuj ne ekzistas alia maniero de realigo, krom la realigo per interveno de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn. Tia estas, ekzemple, la konstituanta rajto de la akurata partio de kontrakto, per kiu estas translaciitaj, konstituitaj aŭ ĉesigitaj absolutaj rajtoj koncerne nemoveblajn materialajn objektojn, postuli ĉesigon de la kontrakto, se la kontraŭa partio kulpe ne estas plenuminta ĝin. Tiu ĉi rajto povas esti realigata nur per la interveno de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn.



III

La estinganta preskripto tuŝas nur unu el la manieroj de realigo de la rajtoj, nome la realigon per ago de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn. La estinganta perskripto aŭ forprenas entute la eblecon de realigo per ago de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn, aŭ limigas tiun ĉi eblecon. Tiel, ĉe la tuŝita monkreditoraĵo la estinganta preskripto forprenas entute la eblecon de realigo de la rajto per ago de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn. Ĉe estingita monkreditoraĵo per estinganta preskripto la realigo de la rajto per ago de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn, estas entute neebla. La titolulo de la estingita monkreditoraĵo per estinganta preskripto povas nek per juĝpretendo nek per ekscepcio en juĝproceso atingi la realigon de la rajto.

Samtiel estas entute forprenita la ebleco de funkciigo de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn, ekzemple ĉe la rajto de la luanto restarigi sian preskripte estingitan rajton koncerne la luatan objekton. Nek per juĝpretendo, nek per ekscepcio en juĝproceso povas la luanto realigi sian preskripte estingitan rajton.

Sed ĉe la konstituanta rajto de la akurata partio postuli la ĉesigon de la kontrakto, per kiu estas translaciitaj, konstituitaj au ĉesigitaj absolutaj rajtoj koncerne nemoveblajn materialajn objektojn, se la kontraŭa partio kulpe ne estas plenuminta la kontrakton, la estinganta preskripto ne forprenas entute la eblecon funkciigi la intervenon de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn. En tiu ĉi kazo la estinganta preskripto nur limigas tiun ĉi eblecon. La estinganta preskripto forprenas la eblecon de la rajto funkciigi la intervenon de la organoj **per juĝpretendo**, sed ne tuŝas ĝian eblecon funkciigi la intervenon de la organoj **per ekscepcio**. Tiel, se la neakurata partio juĝpretendos la plenumon de la kontrakto, la akurata partio povos per ekscepcio sukcese postuli ĉesigon de la kontrakto, kvankam ĝia rajto estas preskripte estingita.

La aliajn manierojn de realigo de la rajtoj la estinganta preskripto ne tuŝas. Ĝi ne tuŝas la manieron de realigo per ago de la titolulo de la rajto. Pro tio rajtoj, kiuj realiĝas nur per ago de la titolulo de la rajto, devas esti konsiderataj kiel preskripte neestingeblaj. Tia estas, ekzemple, la konstituanta rajto de la akurata partio de kontrakto, per kiu ne estas translaciitaj, konstituitaj aŭ ĉesigitaj absolutaj rajtoj

koncerne nemoveblajn objektojn, ĉesigi la kontrakton, se la kontraŭa partio kulpe ne estas plenuminta la kontrakton. Tia estas ankaŭ la monkreditoraĵo, akompanita kun mondebitoraĵo de la kreditoro rilate al lia debitoro. Rajtoj tamen, ĉe kiuj, kiel ekzemple ĉe la rajto de la luanto, la realigo per ago de la titolulo de la rajto ne estas la ununura maniero de realigo, sed tiu ĉi maniero de realigo ekzistas nur dum la objekto estas en la fakta povo de la titolulo de la rajto, la rajto estas preskripte neestingebla ĝis la objekto estas en la fakta povo de la titolulo de la rajto. Nur dum tiu ĉi tempo la rajto estas ekster la sfero de efiko de la estinganta preskripto. Se la objekto eliros el la fakta posedo de la titolulo de la rajto, la rajto eniros en la sferon de efiko de la estinganta preskripto.

Fine, la estinganta preskripto ne tuŝas la libervolan plenumon. Ankaŭ post kiam, ekzemple, la monkreditoraĵo estas estingita per la estinganta preskripto, la monkreditoraĵo povas esti realigata per libervola plenumo.[3])

IV

Tuŝante nur la manieron de realigo de la rajtoj la estinganta preskripto, eĉ kiam forigas entute la eblecon de realigo de la rajto per ago de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn, ne transformas la rajtojn en eksterjura rilato (natura, morala). Ankaŭ post la apliko de la estinganta preskripto, kiu forigas entute la eblecon de realigo de la rajto per ago de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn, la rajto daŭras ekzisti kiel jurrilato, t. e. rilato, akompanita kun ŝtata devigo. Tiu ĉi ŝtata devigo montriĝas ekzemple tiam, kiam la rajto estas plenumita libervole kaj post tio la plenuminto postulos reen la »pagitaĵon« — §118 de la Leĝo de la debitoraĵoj kaj kontraktoj. La menciita teksto ne permesas, ke la plenuminto ricevu reen la »pagitaĵon«. La neebleco esti ricevita reen la »pagitaĵo« estas ŝuldata pro la ŝtata devigo, laŭ kiu la »pagitaĵo« ne povas esti prenita el la havaĵo de la titolulo de la rajto. Vere, la ekzisto de la ŝtata devigo nur en tiu ĉi okazo atestas, ke la restinta ŝtata devigo estas minimuma, sed kvankam minimuma ĝi tamen ekzistas. Ĝia ekzistado montras, ke ankaŭ post la apliko de la estinganta

3) Kompreneble, en la efektiveco de la rajto aperas esenca ŝanĝo. Malaperas serioza stimulo por entrepreno de libervola plenumo- la stimulo, ke, ĉe neplenumo de la debitoraĵo libervole, ĝi povas esti realigata per interveno de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn. La malapero de tiu ĉi stimulo tamen signifas nur mallarĝigon de la fakta realigo de la ebleco de libervola plenumo, sed ne malapero de la ebleco de la libervola plenumo. La ebleco mem de libervola plenumo restas tia, kia ĝi estis, kiam la rajto ne estis preskripte estingita.



preskripto la karaktero de la jurrilato ne ŝanĝiĝas, t. e. la jurilato daŭras resti jurrilato. Pro tio ne estas preciza la larĝe disvastigita koncepto, ke la estinganta preskripto forigas la ŝtatan devigon. Se la estinganta preskripto forigus la ŝtatan devigon, tio ĉi signifus, ke la estinganta preskripto neniigus la rajton.

Ne estas ankaŭ prave aserti, ke la estinganta preskripto neniigas la postulon, t. e., ke post la apliko de la estinganta preskripto la aktiva partio ne povas postuli la realigon de la rajto. Neniigi la postulon, tio ĉi signifas neniigi la rajton mem. La postulo estas necesa elemento de la rajto. Se malaperos la postulo, malaperos la rajto mem. La estinganta preskripto ne neniigas la postulon. La titolulo de la estingita rajto per la estinganta preskripto ne perdas la postulon. Tiel ekzemple la titolulo de la estingita monkreditoraĵo per la estinganta preskripto ne perdas la eblecon postuli la plenumon de la kreditoraĵo. Li perdas nur la eblecon postuli, ke la realigo de la kreditoraĵo estiĝu per la interveno de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajton.

V

La premiso de la apliko de la estinganta preskripto estas la neekzercado de la rajto. La apliko de la estinganta preskripto estas ligita kun la neekzercado de la rajto. La estinganta preskripto estas sekvo de la neekzercado de la rajto. En tiu ĉi senco la estinganta preskripto estas civiljura sankcio de la neekzercado de la rajto.

VI

Grava problemo, preskaŭ ne esplorita en la civiljura teorio, estas la problemo, ĉu per akto, prezentanta ekzercon de iu rajto, povas samtempe esti ekzercata iu alia rajto, t. e. la problemo de la malrekta ekzercado de la rajto. La manko de klareco pri tiu ĉi demando kaŭzas erarojn en la juĝa praktiko.

Povas ekzisti ne nur rekta, sed ankaŭ malrekta ekzercado de la rajtoj. Malrekta ekzercado de la rajtoj ekzistas ĉe la garantiantaj rajtoj.

La garantiantaj rajtoj prezentas tiajn akcesorajn rajtojn, kies destino estas plimultigi la eblojn realigi iun garantiatan rajton. Tiel, la rajto de la konscienca pliboniganto de malpropra tero tenadi la teron kun la plibonitaĵoj ĝis ricevo de la valoro de la plibonigaĵoj, respektive de la elspezoj pri la plibonigaĵoj, estas garantianta rajto. Tiu ĉi rajto plimultigas la eblojn de la pliboniganto realigi sian rajton pri la valoro de la plibonigaĵoj, respektive de la elspezoj pri la plibonigaĵoj. Krom la ebloj, kiujn la pliboniganto kiel ĉiu kreditoro havas, li, kiel titolulo de la garantianta rajto de tenado de la tero kun la plibonigaĵoj,

akiras la akcesoran eblon realigi sian kreditoraĵon pri la plibonigaĵoj, respektive elspezoj. Tiu akcesora eblo estas la eblo limigi la realigon de ekzistantaj pri la tenita tero rajtoj de aliaj personoj kaj tiamaniere realigi devigon, favorantan la realigon de la garantiata rajto.

Garantiantaj estas ankaŭ la rajtoj laŭ kiuj, ekzemple, la titolulo de monkreditoraĵo, se la ŝuldanto ne estas plenuminta sian debitoraĵon, povas postuli vendon de difinita (laŭ kontrakto aŭ leĝo) materiala objekto — movebla aŭ nemovebla — por realigi, per ricevo de ĝia valoro, sian kreditoraĵon.

Garantianta estas ankaŭ la rajto de la titolulo de monkreditoraĵo, se la debitoraĵo ne estas plenumita, postuli la plenumon per tria persono (garantianto).

Garantianta estas ankaŭ la rajto postuli samtempan plenumon de la reciprokaj ŝuldoj. Tia estas, ekzemple, la rajto de la vendanto rifuzi la transdonon de la vendita objekto, se la aĉetanto ankoraŭ ne estas paginta la aĉetsumon.

La menciitaj garantiataj rajtoj estas garantiataj laŭ sia naturo. Tiuj rajtoj havas nenian alian funkcion krom garantiatan. Garantiatan funkcion tamen povas havi ankaŭ rajtoj, kiuj ne estas garantiataj laŭ sia naturo. Ili fariĝas garantiataj nur kiam estas provizitaj per garantiataj funkcioj kaj dum realigas tiajn funkciojn. Ĉe tiaj kazoj tiuj rajtoj, ne perdante sian specifan bazan funkcion, plenumas ankaŭ garantiantan funkcion kaj per tio fariĝas garantiantaj rajtoj koncerne aliajn rajtojn.

La garantiantaj rajtoj laŭ naturo estas rajtoj, ĉar laŭ ilia karaktero ili estas rajtpovoj. Se iuj el ili en la jura lingvo estas nomataj ekscepcioj, kiel ekzemple la rajto de tenado de la malpropra plibonigita tero, per tio estas speciale atentigata ilia ligo kun aliaj rajtoj, estas esprimata ilia kontraŭstarigo al aliaj rajtoj. Laŭ ilia esenco tamen ili estas ordinaraj rajtoj.

La realigo de la garantiantaj rajtoj ankaŭ povas esti diversa, depende de la karaktero de la rajto kaj de la volo de la partioj. La garantianta rajto de postulo samtempecan plenumon de la reciprokaj ŝuldoj realigas per ago de la titolulo. Do, alia maniero de realigo de tiu ĉi rajto estas neebla. Laŭ tiu ĉi maniero povas esti realigata la garantiata rajto de tenado de malpropra plibonigita tero, kiam la tero estas en la fakta posedo de la titolulo de la rajto. Per libervola plenumo povas esti realigata la garantianta rajto, per kiu oni povas postuli, ke iu rajto estu realigita per ago de tria persono (garantianto). Realigante libervole la garantiitan rajton la garantianto samtempe realigas la garantiantan rajton. Fine, la garantiantaj rajtoj povas esti realigataj ankaŭ per la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn. Tiel realiĝas la rajtoj, per kiuj oni povas postuli vendon de difinita materiala objekto, kiel ankaŭ la rajtoj, kiuj ne estas realigitaj per libervola plenumo.



Ankaŭ la realigo de la garantiantaj rajtoj povas esti tuŝita per estinganta preskripto. Kompreneble, tuŝita povas esti nur la realigo per la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn. Ne povas esti tuŝita la realigo de la rajto postuli samtempan plenumon de la reciprokaj ŝuldoj, ĉar la realigo de tiu ĉi rajto ne efektiviĝas per la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn. Pro tio oni povas diri, ke tiu ĉi rajto estas neestingebla per estinganta preskripto. Tia estas ankaŭ la rajto de la pliboniganto de malpropra tero tenadi la plibonigitan teron ĝis ricevo de la valoro de la plibonigaĵoj, respektive de la elspezoj pri la plibonigaĵoj, dum li havas la faktan posedon. Dum tiu ĉi tempo la rajto realiĝas per ago de la titolulo de la rajto kaj ne per ago de la organoj, ŝarĝitaj realigi la rajtojn, kaj pro tio la rajto ne povas esti tuŝita per la estinganta preskripo. Dum tiu ĉi tempo la rajto estas preskripte neestingebla.

La ekzercado de la garantiata rajto ne signifas ekzercadon de la garantianta rajto. Ekzemple, se la plibonigintoj postulos pagon de la valoro de la plibonigaĵoj, respektive de la elspezoj, per tio li ne ekzercos la rajton de tenado. Li ekzercos sian monkreditoraĵon koncerne la valoron de la plibonigaĵoj, respektive pri la elspezoj. Pro tio, se li ne tenas la objekton, la rajto de tenado estingiĝos per la estinganta preskripto, kvankam la garantiita rajto estas ekzercata.

La mala principo tamen ekzistas ĉe la kazo, kiam la garantianta rajto estas ekzercata. La ekzercado de la garantianta rajto estas ekzercado ne nur de la garantianta rajto — rekta ekzercado de la garantianta rajto- sed samtempe ankaŭ ekzercado de la garantiata rajto- malrekta ekzercado de la garantiata rajto. Tiel ekzemple, la realigo de la fakta posedo pri la plibonigita objekto estas ne nur rekta ekzercado de la rajto de tenado, sed ankaŭ malrekta ekzercado de la monkreditoraĵo pri la valoro de la plibonigaĵoj, respektive de la elspezoj. Estas logike nepermeseble akcepti, ke la pibonigintoj, kiu realigas faktan posedon pri la plibonigita objekto por garantii la realigon de sia monkreditoraĵo koncerne la valoron de la plibonigaĵoj, ne ekzercas samtempe sian

kreditorajon. La realigo de la tenado signifas ekzercadon de la garantiita kreditoraĵo. La tenado estas malrekta ekzercado de la kreditoraĵo.

En la leĝaro kaj en la jura praktiko tamen ne ĉiam oni precizigas la dependecon inter garantiata kaj garantianta rajto kaj akceptas, ke estas estingitaj per la estinganta preskripto garantiataj rajtoj, kvankam ili estas ekzercataj per la ekzercado de la garantiantaj rajtoj.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 15, n-ro 3/4 (1965)

629.19; 577.4 (523.4)

## VIVO DE HOMO SUR ALIAJ PLANEDOJ

**(de Prof. B. Popović, Jugoslavio)**

(La prelego en Internacia Somera Universitato en HAGO, 1964)

### Jam en la kosma ŝipo alia vivo

La veturadon per kosma ŝipo ni povas kompari kun neniu alia veturigilo surtera, eĉ ne kun aviadilo. Ili ĉiuj estas firme ligitaj kun la terkrusto kaj kun ĝia envolvaĵo — la atmosfero. Nur la submaran veturadon oni povas iom kompari kun la kosma, ne pro iliaj komunaj ecoj sed pro ilia komuna malsameco rilate al surtera veturado. La malsameco koncernas la spiradon, la aerpremon, eblecojn de nutrado. Ĉe la kosma veturado al ĉio tio aldoniĝas ankaŭ manko de la pezosento, la t. n. senpeza stato.

Jam homo kiu troviĝas sur tre alta monto ne povas spiri tiel libere kiel en la regiono kie li vivas malsupre. Oni tie sentas konstantan mankon de la aero, pro kio la brusto larĝiĝas por kapti pli da aero kaj la spirado montriĝas malfacila — eĉ tre laciga. En la tre alte flugantaj aviadiloj oni sentas la samon en pli granda mezuro kaj oni bezonas aldonon da oksigeno por ebligi la spiradon, por ne sufokiĝi. La larĝiĝo de brusto ne sufiĉus, eĉ se oni povus larĝigi ĝin tiom multe kiom necesas por kapti la saman kvanton da aero. Temas pri ŝanĝoj en la konsisto de la aero, kiu supre havas nesufiĉan relativan kvanton da oksigeno. Pro ĉio tio necesas aldono da oksigeno el speciala kunportata ujo.

La samo, en ankoraŭ pli granda kvanto, estus en simple farita kosma ŝipo. Ju pli alte ni estos des malpli da aero ni havos. Kun granda alteco venas absoluta neebleco spiri, eĉ kun helpo de la oksigenbotelo. La sango venas en la nazon kaj en la buŝon, en tiom pli granda kvanto kiom pli alte ni troviĝas. De kie ĝi venas? Certe el nia korpo mem, el alveoloj de la pulmoj kaj el la finaĵoj de la naz'kapilaroj, do el la lokoj kie la sango estas en plej proksima kontakto